Informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET-55 en Panevėžys, Litovio

# Abelo



Dimanĉo, la 7-a de julio 2019

*N-ro 2*

## Prof. Viktoras Pranckietis Prezidanto de Litovia Sejmo



**Mi salutas vin,**

kolektiĝintajn por la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Tio estas sencoplena solenado de la 100-jariĝo de Litova Esperanto-Asocio. En Litovio la jaro 2020 estas proklamita kiel Jaro de Hebrea Historio, tial mi ne dubas, ke ni ofte mencios la aŭtoron de Esperanto Ludovikon Zamenhofon, ankaŭ liajn meritojn por Litovio kaj por la tutmonda socio.

La internacia lingvo Esperanto estas unika fenomeno en nia mondo. Ĝi estas lingvo de unueca homaro, la lingvo vivanta per la homaj penoj.

Senpera komunikado estas forto de Baltia regiono kaj de la tuta Eŭropo. Via komunumo sendube plivastigas limojn por kunlaboro de eŭropanoj en sferoj scienca, kultura kaj sociala.

Mi dankas Vin pro fortikigo de la komuneco.

Mi bondeziras firman paŝadon sur vojo de progreso kaj sukceson en Via agado!

**Viktoras Pranckietis**

## Programo

### La 8-a de julio (lundo)

| | |
|---|---|
| **7.00–8.00:** | Matenmanĝo – la unua alterno. |
| **8.00–9.00:** | Matenmanĝo – la dua alterno. |
| **10.00–11.00:** | Prelego de prof. Aloyzas Gudavičius pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (ĉambro 117). |
| **10.00–11.00:** | Prelego de prof. Amri Wandel pri spacteleskopoj (ĉambro 204). |
| **10.00–11.00:** | Prelego de d-ro Gábor Márkus „La plej gravaj historiaj eventoj kaj iliaj lingvaj sekvoj" (ĉambro 118). |
| **10.00–12.00:** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (303–311). |
| **11.00–12.00:** | Prelego de prof. Ilona Koutny „Mondo, vortprovizo kaj vortaro" (ĉambro 117). |
| **11.00–12.00:** | Prelego de Yves Nevelsteen „Bitlibroj kaj bitgazetoj en Esperanto" (ĉambro 124) |
| **11.00–12.00:** | Prelegserio de prof. Walter Żelazny pri religioj – la dua prelego (ĉambro 118). |
| **11.00–12.00:** | Prelego de Lee Jungkee „Kien Azia Esperanto-movado iras" (ĉambro 205). |
| **12.30–13.30:** | Tagmanĝo – la unua alterno. |
| **13.30–14.30:** | Tagmanĝo – la dua alterno. |
| **15.00–16.00:** | Prelegserio de d-ro Orlando Raola pri media kemio: la unua prelego „Ĝenerala enkonduko al medioprotekta kemio" (ĉambro 118). |
| **15.00–16.00:** | Prelego de Anna Striganova „Lingvo de fabeloj. Fabeloj pri amo" (ĉambro 117). |
| **15.00–16.00:** | Prelego de prof. Gong Xiaofeng „Instruado de Esperanto en ĉinaj universitatoj kaj lernejoj" (ĉambro 124). |
| **15.00–16.00:** | Intelektaj ludoj kun Tatjana Auderskaja (ĉambro 206). |
| **15.00–16.00:** | **Lanĉo de la nova libro de "Sezonoj" kaj de Litova Esperanto- Asocio "Baza Literatura Krestomatio". Partoprenas Aleksander Korĵenkov, Halina Gorecka, Povilas Jegorovas (ĉambro 204).** |

# Salutvortoj de D-ro Seán Ó Riain, Prezidanto de EEU



## Karaj gesamideanoj kaj gemikoj!

Kiel Prezidanto de EEU, estas por mi granda honoro sendi miajn elkorajn gratulojn al BET-55.

La ĉiujara BET estas inter la plej sukcesaj Esperanto-aranĝoj en Eŭropo, kaj mi esperas, ke ĝi longe daŭros tiel. La litovoj estas pioniroj en la antaŭenigo de Esperanto – mi bone memoras la plezuron de mia partopreno en la tre sukcesa UK en Vilnius en 2005, kaj la sukcesa kaj noviga ĵurnalista konferenco en 2008.

Nuntempe Litovio povas aparte fieri, ĉar la sola membro de Eŭropa Komisiono kiu parolas Esperanton, kaj kiu komprenas la lingvajn problemojn de Eŭropo, estas la Komisionano el Litovio, D-ro Vytenis Andriukaitis. En la opinio de EEU la plej grava tuja laboro estas pligrandigi la nombron de EU-Membroŝtatoj, kiuj oficiale agnoskas Esperanton kiel parton de la nacia nemateria kultura heredaĵo, kaj de la kultura heredaĵo de Eŭropo. Pollando oficiale donis tiun agnoskon en 2014 kaj Kroatio sukcesis fari same en februaro 2019. Kiu estos la tria lando, kiu sukcesos?

Akceptu mian varman dankon por via granda laboro por la lingva justeco kaj por Esperanto, kaj miajn elkorajn gratulojn kaj dezirojn por la sukcesa BET-55.

Amike,

**D-ro Seán Ó Riain**
Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio

**16.00–17.00:** Prelego de prof. Aleksandr Melnikov “Pri Esperantaj vortoj – kun humuro kaj serioze” (ĉambro 117).
**16.00–17.00:** Prelego de Dima Ŝevĉenko “De ‘Progreso’ al ‘Impeto’: kiel estiĝis la Esperanto-eldonejo? (ĉambro 124)”
**16.00–17.00:** Prelegociklo de prof. Walter Żelazny pri sociologio de la Esperanto- movado. La unua prelego (ĉambro 118).
**16.00–17.00:** Ukrainia koncerto (ĉefsalono).
**17.30–18.30:** Vespermanĝo – la unua alterno.
**18.30–19.30:** Vespermanĝo – la dua alterno.
**20.00–21.00:** Koncerto de Kaŝi (ĉefsalono).

# Manĝmenuo por BET-55

**La 2a tago, lundo** (2019-07-08)

| | | |
|---|---|---|
| **Matenmanĝo** 7:00 – 9:00 | Kuiritaj ovoj | 2 ovoj |
| | Majonezo | 30 g |
| | Pano (nigra, blanka) | 40 g |
| | Bulketo | 50 g |
| | Kafo, teo | 200 g |
| **Tagmanĝo** 12:30 – 14:30 | Kukuma supo | 250 g |
| | Fiŝaj fritaĵetoj | 100 g |
| | Fritita porkaĵo | 100 g |
| | Fagopira kaĉo | 100 g |
| | Salato el freŝ-brasikoj | 60 g |
| | Freŝaj legomoj | 40 g |
| **Vespermanĝo** 17:30 -19:30 | Terpomaj platkukoj kun kazeo, krema saŭco | 220g / 40 g |
| | Cepelinoj (terpomaj buloj) kun kazeo, krema saŭco | 200 g / 40 g |
| | Teo | 200 g |



# Kultura programo de BET dimanĉe 7.7.2019 dum la solena inaŭguro



## Karaj partoprenantoj kaj gastoj de Baltiaj Esperanto-Tagoj,

okaze de via kunveno vin sincere salutas artaj grupoj de Komunuma Palaco de la urbo Panevėžys: grupo de junulara dancrondo „Grandinėlė“, gvidantino Zita Rimkuvienė, grupo de pli aĝaj dancantoj de popoldancoj „Verdenė“ (dekstre supre), gvidanto Vytautas Murauskas, miksita koruso „Čiūto“ (dekstre sube) kaj vokala ensemblo „Smiltelė“ (maldekstre sube), gvidantino Dalia Gaspariūnienė. Ni bondeziras sukceson al vi en viaj ĉiutagaj agadoj, ridojn kaj varmkoran etoson en via amikaj vesperaj programoj.

Por viaj okuloj kaj koroj ni destinas lirikajn kantojn kaj gajajn dancojn. Bonvenon al Litovio!

1. Kanto „Ĉirkaŭ ni Litovio“ (Ĉiūto)
2. Danco „Pordego de Suno“ (Verdenė)
3. Kanto „Nia naskiĝlando Litovio“ (Ĉiūto)
4. Danco „La eta bojaro“ (Grandinėlė)
5. Kanto „Nostalgio pri naskiĝloko“ (Smiltelė)
6. Danco „Konkurado“ (Verdenė)
7. Danco „Agotėlė“ (Grandinėlė)
8. Kanto „Vilaĝaj vesperoj“ (Smiltelė)
9. Danco „Polko de petolemulo“ (Verdenė)
10. Danco „Kurante malfruiĝante“ (Grandinėlė)
11. Kanto „Naskiĝloko (Smiltelė)
12. Danco „Loĝanto de Rusne“
13. Kanto „Naskiĝloko“






# Vojaĝkostoj en la urbo


| | Plena prezo | 50 % rabato** | 80 % rabato *** |
|---|---|---|---|
| Taga bileto* | 1,40 eur. | 0,70 eur. | 0,28 eur. |
| Unufoja bileto | 0,52 eur. | 0,26 eur. | 0,10 eur. |
| Unufoja bileto aĉetita en buso | 0,64 eur. | – | – |

* **La tutaga bileto** estas aĉetebla nur en gazetkioskoj. Ĝi validas la tutan diurnon. Signi nur unufoje. Por uzado de la bileto kun rabato vi devas havi dokumenton.

** **50%-a rabato:** por 70-80-jaraj homoj.

*** **80%-a rabato:** por homoj de 80 jaroj.






## Tuta biblioteko en unu volumo

**Nova eldono, korektita kaj ampleksigita**
**199 verkoj kaj fragmentoj de 82 aŭtoroj**
**Eldonis *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio**
**368 paĝoj. Prezo: 27 eŭroj.**
**Speciala unuataga prezo: 27 eŭroj.**
**Aĉetebla en la libroservo kaj ĉe Halina Gorecka**





La libroservo en ĉambro 112 sur la unua etaĝo



"Sankta triopo" en la akceptejo
Fotoj: Gražvydas Jurgelevičius

## Anonco por frumatenaj birdoj:

Pentru kun ni! Pentru ni kune, pentru libere, kuraĝe pentru ĝoje kaj senĝene! Sperto ne gravas, gravas plezuro! Mi invitas ŝatantojn de vakskreto kaj krajono al komuna skizpromeno – unu horon antaŭ matenmanĝo. Ni renkontiĝu ĉe la BET-a enirejo. Vidu: "Pentru ni!" ĉe FB. **Lusi Rimon**



## Ĉu vi volas kontribui al *Abelo*?

En *Abelo* vi trovas aktualaĵojn, informojn, anoncojn pri salonoj de la programeroj, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, priskribon de BET-55, fotojn k.s. La enhavo dependas ankaŭ de la kontribuoj de la BET-anoj mem, kiuj bonvolu raporti pri siaj impresoj, programeroj, ideoj (eks)kursoj ktp, kaj poste aŭ metu la kontribuojn en tiucelan ☚ skatolon ĉe la akceptejo, aŭ sendu ilin rete al: *stano.marcek@gmail.com*. Ankaŭ kvalitaj fotoj estas bonvenaj, same kiel pri-BET-aj anekdotoj kaj rakontoj.



**Stano Marček, via redaktoro**



Lastmomenta sciigo: filmo pri la unuaj momentoj de BET-55 spekteblas ĉe *https://youtu.be/j0La8g-p2lU*